

August Heinrich Hoffmann,

Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Ree vesperiĝas
 ĉie en la rond',
 paco subeniĝas
 kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas
 ĉe la roko jen,
 kaj ĝi daŭre bruas
 plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu
 endormigas ĝin,
 sonoril' neni
 je la tago-fin'.

Mia koro, tia
 estas ankaŭ vi!
 Pacon trovos mia
 koro nur en Di'.

...

August Heinrich Hoffmann,

Abendlied

tradukita de Manfredo Ratislavo

Nun vesper' fariĝas
 Ree tie ĉi,
 Paco subeniĝas
 Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas
 Ĉe la roko sen
 Ĉeso kaj ĝi bruas
 Plu kaj plue jen.

Sonoril' neni
 Ripozigas ĝin,
 Ne dormigas iu
 Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,
 Estas ankaŭ vi.
 Donu, ho Sinjoro,
 Pacon vi al ĝi.

...

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-01-27.*

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2012-11.*

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html, la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.